

ESPERANTA FINNLANDO

1968 numero 7

A

Novembro



Foto de E.Järvinen

EKSKURSO AL TURKU

La sesan de oktobro reciprokis Esperanto-klubo de Helsinki viziton al Turku, de kie en la pasinta printempo oni faris ekskurson al Helsinki. Partoprenis ĉ. 40 personoj kaj la vojaĝo torentis sub la signo de gaja kantado. La programo aranĝita de turkuanoj estis riĉa kaj varia: rondveturo en la urbo al vidindaĵoj, prizorgata kaj gvidata de sro Ahomäki, klarvoĉe kaj elegante; vizito al la modernega kremaciejo; elmonro de la katedralo kaj orgeno fare de emerita orgenisto Riihivaara; interesa rondiro en la eslorejoj de prof. Yrjö Väisälä, kiu mem bonhumore en esperanto prezentis siajn miraklajn aparatojn. Esperanto-klubo de Turku gastigis la ekskursanaron per ĉiaspecaj bongustaĵoj: kafo, kukoj, sandviĉoi ktp. Grandan dankon al la turkuanoj pro la gastamo.

DISKUTO PRI ESPERANTO

Mi renkontiĝis sur la strato kun iu mia konatulo.

— Nu, kien vi iras? — li demandis post la reciprokaj salutoj.

— Al la esperantistoj.

— Kaj kial? — li demandis surpriziĝe.

— Ĉar mi estas esperantisto.

Ekteruriĝe li ekhaltis.

— Es - pe - ran - tis - to? — li demandis per grandaj okuloj, ĉar li altestimis min kaj neniam li povis supozi pri mi tian frenezajon.

— Jes — mi respondis per indiferenta tono.

Eĉ lia spirado ekhaltis kaj dum momentoj li ne povis paroli.

Sed li, — kiel mi jam menciis — altestimis min kaj ne volis min ofendi. Prefere li interesiĝis, per kiaspecaj simptomoj manifestiĝas ĉe mi tiu... tiu... eco.

— Nu, — mi respondis, — mi vizitas la kunvenojn, korespondas, legas, verkas, do sume: mi agitadas por Esperanto.

Li jam estis tute ŝokita, Apenaŭ li povis rekonsciiĝi, sed fine li demandis per balbuta voĉo:

— Sed... sed tiun lingvon parolas nur malmultaj homoj. Kial vi agitadas por ĝi?

— Kial? Ĉu ne vi mem diris, ke Esperanton parolas nur malmultaj homoj?

— Nu jes... Sed ĝuste pro tio...

— Vi tute pravas. Ĝuste pro tio! Se la lingvon jam ĉiu homo parolus, mia agitado jam estus superflua.

Kapbalancante li enpenisiĝis. Post kelkaj momentoj li ekparolis.

— Kaj kiel la diverslingvanoj povas kompreni unu la alian esperantlingve?

— Tute, kiel vi mem diris: esperantlingve. Diverslingve ili ne komprenus unu la alian.

— Vi ne komprenis min.

— Kvankam ni estas samlingvanoj.

— Ne konfuzu miajn vortojn. Ekzemple la vorton "kolonelo" la angloj prononcas "kernel" la francoj "kolonel", la italoj "kolonello". Kiel la esperantistoj povas kompreni la diversajn dialektojn?

— Vi tute pravus, se la anglaj esperantistoj dirus "kernel", la francoj "kolonel", la germanoj "oberst", la rusoj "polkovnik". Tio vere kaŭzus ioman konfuzon, sed la esperanta lingvo havas propran nomon por tio: "kolonelo" kaj ĉiu lernas la saman en la tuta mondo.

— Kaj ĉu ne estas diferenco en la prononcoj?

— Kelkfoje okazas, ke iu ĉino ne povas ĝuste prononci la literon "r" kaj anstataŭe diras "l", aŭ la francoj "h", sed neniam okazas tiom gravaj diferencoj, kiomaj ekzistas inter la dialektoj de la sama nacia lingvo kaj kiujn tamen bone komprenas la samnaciaoj.

— Mi tamen ne povas imagi, ke diversnaciaj esperantistoj povus kompreni unu la alian.

Ĉu vi jam provis paroli Esperante kun alinaciano?

— Kiel vi imagas? Mi ne konas la lingvon!

— Kara amiko! Ni supozu, ke mi asertus al vi, ke per integralo oni ne povas elkalkuli la surfacon de la globo kaj poste evidentiĝus, ke mi absolute ne konas la matematikon. **Kion** vi opinius pri mia aŭdaca laikeco?

— Sed tiu lingvo ne havas animon.

— Ĉu la pontoj havas animon? Kaj tamen ili kunligas la bordojn. Sed kion vi volas signifi per la vorto "animo"?

— La literaturan uzeblacon. Esperanto ne estas oportuna por literaturo.

— Ĉu vi jam legis esperantan literaturajon?

— Mi ripetas: mi ne konas la lingvon.

— Tamen vi opiniadas.

— Ĉar multaj homoj diras la samon.

— Jes, mi scias: Esperanto estas la sola scienca teritorio, en kiu la laikaj fakopinioj estas ĝenerala kutimo.

— Kaj ĉu la uzado de Esperanto en literaturo ne kaŭzas malaltiĝon de la nivelo?

— Kara amiko, diru al mi: kiaspecaj poemoj estas pli altnivelaj: ĉu la krajone skribitaj, aŭ la inke skribitaj?

— Kiaspeca demando! La nivelo ne dependas de la skribilo.

— Nu, la lingvo estas ankaŭ ilo. Komunikilo. Kiam Zamenhof skribis siajn pensojn esperantlingve, tio havis nivelon. Se vi skribus viajn pensojn, tio ne havus nivelon.

— Ne tro ĝentila respondo, sed ne gravas. Ĉu vi ne rimarkis ankoraŭ, ke preskaŭ neniu registaro favoras Esperanton? Kelkaj direkte persekutas ĝin, la ceteraj kondutas maksimum indiferente, sed neniu ĝin enkondukis en la lernejon?

— Tio estas tute komprenebla. Mi primiras nur la toleremon de tiuj registaroj, kiuj malamas nian movadon, ke ili ne krucumis ankoraŭ ĉiun esperantiston.

— Kiel? ĉu eĉ vi parolas tiel? — li demandis surprizite.

— Kvankam mi ne kunsentas, tamen mi

ITA — ATA EN MADRIDO

La prezidanto de UEA diris (laŭ Revuo Esperanto, 9—1968) i.a.: "la plej rigora observado de la decidoj kaj rekomendoj de la Akademio estas antaŭkondiĉo por ĉia sukcesa laboro por la Akademio kiel tia, kaj misprezentoj de ĝiaj unuopaj decidoj aŭ rekomendoj aŭ atencoj al la digno kaj scienca reputacio de ĝiaj membroj, estas forte kondamnindaj kiel rekta sabotado de la laboro por la Internacia Lingvo . . . Asocio ne povas kontentige funkcii, se ĝi ne kunligas en sia organiza strukturo internaciecon kaj demokratecon kun plej alta grado de efikeco."

Ni plene samopiniis kun la lasta frazo, sed akcentas, ke al la demokrataj principoj apartenas antaŭ ĉio libereco de esprimo kaj kritiko. Kaj, ĉe voĉdonoj, la eventuala opozicio aŭ malplimulto havas la primitivan rajton mem formuli sian proponon antaŭ la prezento al voĉdono (aludo al la artikolo "Laŭstatuta kunveno" en EF 6/68, p. 78—79).

komprenas ilin. Esperanto estas pacminaca lingvo.

— Kia? !

— Pacminaca. Ĝi minacas per paco.

— Mi — na — cas? !

— Nature. Nome, Esperanto estas la sola ilo, kies uzado povas kaŭzi nur bonajn rezultojn. Esperantlingve oni povas same mensogi al la amasoj, kiel nacilingve, sed, se la popoloj komprenos unu la alian, tio rezultigos nur interpaciĝon kaj la ĉesiĝon de la malamo. Kaj tio estas la plej granda danĝero por la mond' eterne militanta.

Li skuis la kapon.

— Vi ne povas min konvinki. Mi malamas Esperanton.

— Ne tro ĝentila respondo. Eĉ mi mem malamas la idiotajn homojn, sed mi ne deklaras mian malestimon tiom senkaŝe al ili.

Ni estis ĉe stratangulo. Li ĵetis al mi glacian alrigardon.

— Bedaŭrinde, ni devas disiĝi — li diris ofendite. — Mi jam devas iri flankdirekten.

Ni adiaŭis. Li malaperis en la flankstrato, mi daŭrigis miajn paŝojn rekte.

Al la voj' elektita.

Sándor Szathmári

Pri la ita-ata problemo ne estas kaŭzo ion novan skribi. Ankaŭ mi ne volas misprezenti ion en la agado de la Akademio nek atenci kontraŭ ĝiaj membroj. Estu nur diritaj kelkaj faktoj. La legantoj konkludu mem.

Por la lasta voĉdono estis prezentataj kelkaj frazoj kun du alternativaj eksplikoj de la senco. La eksplikoj A estis prezentataj de itistoj kaj estis do evidente konformaj al la aspekta sistemo, sed parte ankaŭ aprobindaj laŭ la tempa kompreno. La eksplikoj B estis ankaŭ formulitaj de itistoj. Kies opinion ili reprezentas, mi ne scias. Almenaŭ ili ne estas konformaj al la tempa sistemo.

En la voĉdono, A venkis kontraŭ B. Sekve la estraro de la Akademio informis, ke la aspekta sistemo estas akceptita, la tempa rifuzita.

Nun ekzistas du eblecoj. Aŭ la juĝantoj sciis, ke la eksplikoj B ne estis konformaj al la principoj tempaj. Aŭ ili ne komprenis, ke ili ne estis tiaj. Kio estas la konkludo, konjektu ĉiu mem, kiu scias la ĝustan alternativon.

Ĉiuokaze estas nerefutebla la fakto, ke ne okazis voĉdono inter aspekta kaj tempa sistemoj.

V.S.

ESPERANTO FIRMIGAS SIAN POZICION

Laŭ nova decido de la Pola Ministerio de Klerigo kaj Superaj Lernejoj, ĉiuj lernejoj unua- kaj dua-gradaj, kiuj decidis enkonduki la instruadon de la Internacia Lingvo, devas sekvi la oficialan instruprogramon preparitan de Pola Esperanto-Asocio kaj ĵus aprobitan de la Ministerio. La aprobo de la instruoprogramo estas nova sukceso en la batalo por akceptigi Esperanton kiel egalrajta kun aliaj instruobjektoj. Laŭ la nombro de lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata, Polujo jam tenas la kvaran lokon en la mondo, post Bulgarujo, Hungarujo kaj Francujo.

SUBPREMO EN LA AKADEMIO?

Niaj legantoj memoras, ke estis siatempe polemiko pri tio, ĉu en la kadro de Akademio okazas subpremo ev. por forigi la subskribinton el la Akademio. Nun mi simple notas jenon: siatempe mi estas invitita labori en komisiono por kontroli lernolibrojn de Esperanto. Antaŭ kelkaj monatoj (mi estas konstante tro okupita kaj tial ne reagis pli frue) mi ricevis informon, ke nia eminenta aŭtoro kaj verkisto William Auld verkis novan lernolibron por internacia uzo (do sen komparoj al naciaj lingvoj). Sed la direktoro de la nomita komisiono resendis la manuskripton kun informo, ke la libro ne povas esti rekomendata de la komisiono, ĉar la verkinto tute ne tuŝas la problemon ita-ata. Al mi li tute ne sendis la manuskripton kaj do ankaŭ ne petis mian opinion. Anstataŭ tio li en sama letero (aŭ karto) demandis, ĉu mi ne volas ekŝigi el la komisiono, verŝajne, ĉar li atendis, ke mi havos alian opinion.

Mi konas la verkon "Esperanto: a new approach" de sama aŭtoro kaj scias, ke la verko estas eminenta, eble la plej bona el ĉiuj nacilingvaj lernolibroj de Esperanto, kiun ĝi pritraktas nur de la vidpunkto de Esperanto mem. Mi do povas konkludi, ke la proponita nova lernolibro ankaŭ estas eminenta. Estas granda domaĝo, se ĝi ne povos aperi.

Vilho Setälä

+ + + + +

LA TRAGEDIO DE L' HOMO

Vi estas fortaj, agas vi arbitre,
ho, sed ĉu bone — juĝos la ĉiel'!
El nia sang' luktantoj novaj kreskos!
Ni iru, fratoj, al la glora morto!

Kial vi staras mute, terurite?
Ĉu vi rigardas tragedio ĝin?
Rigardu farso ĝin kaj ĝi amuzos.

Ho ve, ne ŝercu! Se por sola "i"
tiel decide oni iras morton:
Do kio estas granda kaj majesto?

Madách

LA "ANALFABETO" EN MADRID

Internacia Arta Teatro ludis en la UK en Madrido komedieton "Analfabeto", kiun ni jam konas de jaroj. La komedio fontas en la fakto, ke la vorto 'analfabeto' estas nekonata al vilaĝa oficisto.

Evidente la komedio havis bonan sukceson en Madrido. Neniam tio povus okazi en Finnlando. Kial?


Esperantisto, nun en grava gvidanta posteno, foje preskaŭ malŝate kaj rifuze esprimis sin pri la fakto, ke finna lingvo, simile kiel Esperanto, uzas multe da derivaĵoj el siaj propraj fontoj, kaj preferas tion eĉ en okazoj kie aliaj lingvoj uzas la latinajn aŭ grekajn vortojn malgraŭ tio ke ili estas fremdaj al la koncerna lingvo, origine. Li eĉ ne volis aŭdi nian argumenton, ke la purismo forte akcelas la disvastiĝon de progresinta kulturo inter la unulingva popolo. Kiel ekzemplojn ni volis citi 'polkupyörä', lauvorte 'tred-rado', en senco de biciklo kaj 'veturi', laŭvorte 'tiranto', kun la noto ke -uri ofte signifas maŝinon, agantan kvazaŭ vivanta estaĵo (dum faranta persono estas formata per sufikso -ja, -jä = anto). Estas ja klare, ke la lasta estas pli esprima ol 'lokomotivo' la finno, kiu konas nek la vorton 'loko' nek 'motivo'.

Nun, ĉi tio estas nova argumento. Se ministerio en nia lando petus informon pri analfabetoj en diversaj distriktoj, ĝi ne uzos la vorton analfabeto sed la tradukon de "ne-legokapabla" (lukutaidoton), kiun komprenus eĉ persono, kiu neniam vizitis lernejon, se oni ankoraŭ sukcesus trovi tian. (Notu, ke ambaŭ vortoj estas 5-silabaj: ni do ne perdas eĉ en la koncizo.

Niaj vortoj ja ofte estas longaj. Kompense ni bezonas malpli da vortoj. Ekz. la teksto en la komenco de la "Agoj" en Nova Testamento, kiu en finna lingvo enhavas 150 vortojn, havas en la esperanta teksto 176 vortojn kaj en la angla 213. Kaj jen alia ekzemplo. La finna vorto

makuuhuoneessammekin (1 vorto)
signifas
ankaŭ en nia dormoĉambro (4 vortoj)
angle

also in our sleeping room (5 vortoj).
Mi konstatis, ke variigo de ĉio alia ol la "ĉambro" (pli ol 40 adjektoj, dekduo da prepozicioj/kazoj, 6 posedaj indikoj kaj aliaj adverboj pro 'ankaŭ'), atentante ankaŭ la kazojn kie unu aŭ alia el la modifaj elementoj mankas, oni povas formi en finna



INFORMOJ DE LOKA KONGRESA KOMITATO DE LA 54-A UNIVERSALA KONGRESO

La preparoj por la 54-a Universala Kongreso de Esperanto progresas laŭplane en Helsinko. Kompreneble LKK provas ĉiel helpi kaj servi la kongresanojn, por kiuj jam nun estas pretaj kelkaj tre interesaj broŝuroj pri Finnlando.

Se esperantistoj el la tuta mondo amase petas por si ĉi tiujn eldonaĵojn, tio nature multe helpas la strebadojn de LKK. Bonvolu do sendi letereton, en kiu vi aludas al eventuala partopreno en la Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko somere 1969, al la koncernaj instancoj zorgantaj pri distribuado de broŝuroj por peti kelkajn ekzemplerojn de la menciitaj publikaĵoj.

Alia, tre efika agadmaniero estas turni sin skribe aŭ persone al finnaj ambasadoj ĉie en la mondo. Verŝajne la ambasadoj ne havas la broŝurojn, sed ili povas havigi por vi ankaŭ Esperantan informan materialon laŭ via peto.

Jen ni donas liston pri la pretaj, jam ekzistantaj broŝuroj pri Finnlando. Estas krome menciinde aldoni, ke la granda meblofabriko ASKO en la urbo Lahti eldonos post kelkaj monatoj propran broŝuron por ĉiuj kongresanoj. Ankaŭ aliaj similaj aranĝoj estas preparataj.

Sincere Via

Jorma Ahomäki
EKSKURSA SERVO
Piispanristi/TURKU
Finnlando, tel. 921-86004

TURISMAJ BROŜUROJ PRI FINNLANDO

1. "Amika Finnlando" eldonita de FINNLANDA TURISMA ASOCIO. Belaj multkoloraj bildoj. Mapo de Finnlando. Sciindaj praktikaj konsiloj por turistoj. Iom pli detalaj informoj pri la lando sub la titoloj: "Helsinki kaj suda Finnlando", "Lagolando", "Kuusamo kaj Laponio". Distribuas: Suomen Matkailuliitto, Helsinki.
2. "Rigardu Finnlandon" eldonita de MINISTREJO DE EKSTERLANDAJ AFEROJ. Poŝformata 32-paĝa libreto kun plasta kovrilo. Nigra-blankaj kaj multkoloraj fotoj. Ĝeneralaj informoj pri Finnlando sub titoloj: LA POPOLO, REGADO KAJ ADMINISTRADO, EDUKADO, KULTURA VIVO, SPORTO ktp. ktp. Distribuas: Ulkoasiain ministeriö, Helsinki.
3. "Helsinki, filino de Balta maro" eldonita de TURISMA OFICEJO DE HELSINKI. Multkoloraj bildoj. Stratmapo pri la centro de Helsinki, ankaŭ la situo de OTANIEMI, kie kuŝas la kongresejo, estas videbla en la mapo. Distribuas: Kaupungin matkailutoimisto, Pohjoinen Esplanadikatu 17, Helsinki.
4. "Turku, Finnlando" eldonita de TURISMA OFICEJO DE TURKU. Kvarkolora eta faldfolio kun ĝeneralaj informoj pri la urbo. Distribuas: Kaupungin matkailutoimisto, Linnankatu 8, Turku.
5. "Aboa vetus & nova" eldonita de LOKAJ EKLEZIOJ EN TURKU. Kvarpaĝa faldfolio pri la Katedralo de Turku. Distribuas: Seurakuntien tiedotustoimisto, Turku.
6. "Kongresa afiŝo". Distribuas: Kaupungin matkailutoimisto, Helsinki.

lingvo el la ĉ. 60 lingvaj elementoj pli ol 20.000 diversajn vortojn, kies tradukoj konsistos el sama nombro da alilingvaj esprimoj, plejparte el 4-5 vortoj.

Por eksterlanda leganto ni donu ankoraŭ

la glosaron: makuu = kuŝo, dormo; huone = ĉambro; -ssa = en; -mme = nia; -kin = ankaŭ.

V.S.

LIBE LIGO INTERNACIA DE BLIN- DAJ ESPERANTISTOJ

La Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj estas internacia organizo de blinduloj. Anoj troviĝas nuntempe en ĉiuj kontinentoj, ili estas kaj individuoj kaj asocioj. Ĉiu ano havas en balotado organiza, kiu ĉiam okazas letere, unu voĉon. Tiukaze ankaŭ ano en tia asocio, kiu estas membro de Libe, estas pritraktata kiel membro individua. Ĝenerale landa asocio de blindaj esperantistoj apartenas al Libe kiel membro; tiel ankaŭ Steleto r.y., la asocio de Blindaj Esperantistoj en Finnlando.

La estraro de Libe konsistas el franca muzikinstruisto prof. Raymond Gonin kiel prezidanto; itala filozofi-doktoro Aldo Grassini kiel ĉefsekretario; itala muzikinstruisto prof. Guglielmo Vassio kiel kasisto kaj kiel aliaj estraranoj anglo Eunice Hughes; svizo Antonio Pellanda kaj dano Poul Glygaard. Interŝanĝo de estraranoj estas prizorgata tiel, ke en voĉdonado ĉiun duan jaron tri novaj anoj estas elektataj.

Agado de Libe funkcias en ĉi tia formo de la jaro 1950, kiam estis revivigata la internacia organizo de blinduloj, kiu ekzistis kaj agis komence de la jarcento unue kiel Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj kaj poste kiel Universala Asocio de Blindulorganizajoj.

La Plej grava agadformo de Libe por progreso de la internacia kunlaboro inter blinduloj estas eldono de la gazeto Esperanta Ligilo. Ĝi aperas en Brajla skribo redaktata de jam menciita Raymond Gonin. La enhavo konsistas precipe el oficialaj informoj kaj sciigoj, esperanto-novaĵoj kaj beletraj verkaĵoj.

Esperanta Ligilo estas fondita jam en la jaro 1904. La plej gravan laboron en la publikigado faris svedo Harald Thilander, kiu dum la jaroj 1912–1958 preskaŭ siakoste presis kaj dissendis la gazeton al ĉiu deziranta ne-vidanto ĉirkaŭ la mondo.

Alia grava tasko nuntempa de Libe estas eldono de literaturo en Brajla skribo tiel profite, ke ankaŭ ili, kiuj estas en la plej malalta ekonomia situacio, kapablu havigi al si librojn. Libe prezsigis en Brajla skribo ĝis nun, krom beletron, i.a. la biografion de Zamenhof kaj ankaŭ verkojn de Zamenhof kiel ekzemple Lingvaj Problemoj.

Por helpi landajn organizojn en havigo de instrua materialo aperis kiel la lasta eldonaĵo de Libe la verko Koordinataj Esperantokursoj.

LA INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ EN HELSINGØR 1968

Al la altlernejo,
jen, bona ideo!

... ricevita jam antaŭ unu jaro, kiam la inter-norda konkursa esperantokurso por blinduloj estis planita kaj aranĝita. Kiel premio por la plej bone sukcesontaj partoprenontoj deleterkursoj en ĉiu lando estis promesita stipendio por la feria semajno en Helsingør. Steleto, la esperanto asocio de blinduloj en Finnlando, solvis la demandon de la stipendioj tiel, ke ĉiu vojaĝonta partoprenanto ricevu ioman stipendion, la venkonto pli grandan. — Tri el la partoprenantoj, la ĉefstipendiulo Eero Vartio el Helsinko, Lea Hiltunen el Lahti kaj Väinö Hyvärinen el Oulu havis okazon por veturi al Helsingør kaj la subskribinto sekvis kiel la kvara. Tial tiu ĉi vojaĝraporto rakontas pleje pri la feria semajno de ne-vidantoj.

En bela dimanĉa somermateno la 21.7.1968 nia malgranda grupo veturis aere al Kopenhago, kie okazis eta epizodo. En la atendeja halo de la ĉefa fervoja stacio, kie ni pasigis iom pli ol unu horon, tre ĉarma juna sinjorino el Arabaj landoj postulis nian opinion pri la proksimorienta problemoj inter sia propra lando kaj Israelo. Feliĉe, ke la trajno ekveturis al Helsingør ĝuste en la tempo, kiam la situacio postulis pliajn diplomatajn talentojn ol kion ni havis kaj kapablis per nia lingvoscio en angla esprimi por konvinki ŝin pri la opinio, ke "nia lando estas tiel malproksima, ke ordinara civitano ne difinas sian pozicion al tiu problemoj". Verŝajne ŝi vidis, ke niaj oreloj moviĝis. — Ho, kia malamo inter la najbaraj nacioj estis videbla en ŝiaj flamemaj okuloj kaj aŭdebla el ŝia buŝo. Sinjoro Jarring, ni ne envas vin!

Post unuhora vagonara veturado ni estis en Helsingør, la bela urbo ĉe la markolo Øresund, kaj post kelkaj minutoj per taksio en la Internacia Altlernejo, nia

Esperanto ne akiris eĉ favoron de blinduloj kiel dominantanta kontaktilo, kvankam interesiĝo pri Esperanto inter ili estas eble pli vigla ol tiu inter vidantoj. Tamen la celo de Libe estas per la lingvo internacia pli kaj pli klopodi en servado de blindulorganizoj en praktikaj aranĝoj kaj kontaktoj internaciaj. El ili estu menciata, ke Libe havas siajn internaciajn kongresojn ĉiam kune kun la UEA-kongreso.

Arvi Karvinen

restadejo dum ok sekvintaj tagoj. Tie ni estis kore bonvensalutataj de gesinjoroj Friis, la ĉiam same entuziasmaj samideanoj, ĉarmaj homoj kaj fidelaj amikoj de Finnlando. Ni renkontis ankaŭ aliajn partoprenantojn el Finnlando; ni estis entute 15, el ili 3 infanoj. — La tuta aro estis proksimume cent anoj el 11 nacioj, dek el Eŭropo kaj unu el Usono. Vere internacia rondo.

La taga programo entenis — krom ege bone prizorgita materia parto: matenmanĝo, lunĉo kaj tagmanĝo — antaŭtagmeze lecionojn kaj prelegojn dum tri horoj, posttagmeze promenojn kaj ekskursojn kaj vespere programon, ĉiutage. Io por ĉiu la tutan tagon, vere riĉa programo. Tuj en la unua vespero estis solena malfermo en la bela granda salono.

Studrondoj estis entute tri: la elementa kurso laŭ Friis-metodo, germano Heinrich Müller kiel gvidanto; perfektiga studrondo sub gvidado de sinjoro Moravec kaj konversacia studrondo, kie fraŭlino Riisberg paroligis partoprenantojn. Nia grupeto partoprenis lecionojn de sinjoro Muller dum la tri unuaj tagoj, post kio svedo, sinjoro Viggen, ankaŭ blinda, prizorgis gvidadon de ne-vidantoj en la elementa nivelo.

Posttagmezaj ekskursoj estis direktitaj al historie kaj alie interesaj lokoj kaj konstruaĵoj piede aŭ aŭtobuse, eks. lunde al la kastelo Kronborg en Helsingør. — Ni vere vizitis malsanulejon pro akcidento, feliĉe ne severa sed tamen kaŭzanta plastron sur la fronton de Eero Vartio. Merkrede en la programo estis veturado al la kasteloj en Fredensborg, dum kiu ekskurso ne-vidantoj estis invititaj al gesinjoroj Spangbo, en kies hejmo, ĝardeno kaj domo ni, havis agrablan posttagmezon kaj ricevis riĉan gastigadon. Jaŭde okazis ekskurso al Helsingør, kaj Nevidantoj estis invititaj al Kopenhago kiel gastoj de la centra landa blindula organizo. Ni havis okazon viziti iuspecan protektan hejmon por blinduloj, kiu domo estis maljunuleja hejmo por parto de enloĝantoj, loĝejo por aliaj flegadon aŭ prizorgon bezonantaj. Tie troviĝis ankaŭ laborejo kun instruistoj kaj gvidantoj, pleje en laborterapia senco, mi komprenis. Post kaŭtrinkado tie ni vizitis loĝdomojn konstruitajn por blinduloj tiel, ke ekzemple la numero kaj nomo de strato estis faritaj per "reliefaj" literoj, legeblaj per manoj, same la nomo-listo de enloĝantoj ĉe la eksteraj pordoj kaj la sonorilo tie. Ni vizitis du specajn apartamentojn tie, loĝejon por fraŭlo kaj tiun por familio. Vespere ni estis ege lukse gastigataj en la festa salono de blindul-organizoj landaj; kiel gastiganto estis la centra ligo. Maljam meznokte ni estis hejme.

El vesperaj aranĝoj estu menciata kolorfilmo, farita de s-ro Friis pri feriaj kursoj dum jaroj kaj jardekoj en Helsingør, en la lunda vespero; marde prelego de s-ro Ib Schleicher pri la Homaj Rajtoj, per flua elparolo, oratoraj esprimoj kaj la enhavo vere interesa. Marde ni finnoj havis propran programon, dum kiu ni per broŝuroj kaj lumbildoj rakontis pri la lando de la venonta UEA-kongreso. "La Somertago en Kangasala" apartenis al la programo kiel komuna kantado. Vendrede vespere gesinjoroj Kehler faris vojaĝrakonton pri veturo tra Italujo, per belaj lumbildoj. Sabatvespere estis finfesto, el kies programo la plej amuza estis solkantado kaj -dancado de relative dika skolto s-ro Fettes, kiu dum la semajno akompanis nian kantadon. Kaj kompreneble estis parolado de s-ro Friis, entuziasma kaj varmkora, instiga kaj optimista por nia komuna afero, la lingvo internacia.

Ni havis vere sukcesan ferian semajnon, dum kiu ni ricevis almenaŭ unu gravan instruon: Ĉiu partoprenanto de internaciaj feriaj kursoj havu sufiĉe da lingvoscio por mem almenaŭ bonete esprimi siajn pensojn kaj kompreni tiujn de la aliaj. Sen tio ni ne povas utiligi la aranĝojn sufiĉe, estu ili kiel ajn bonaj.

Tuovi Palomäki

LA GENIO DE ZAMENHOF

Ni legas el "Brita Esperantisto":

La fama interpretisto A.H.Birse, C.B.E, (ne demandu al ni la sencon de la lastaj tri literoj!) rakontas i.a.:

Ruse parolanta kritikisto foje dubis pri la ĝusteco de la interpreto fare de Birse koncerne iun rusan verbon. Estas interese konstati, ke la kritikisto eraris, ĉar li ne komprenis la diferencon inter perfekta kaj imperfekta aspektoj de la vorto — grava komplikaĵo de la rusa gramatiko. Oni rimarkas, kiel saĝa estis d-ro Zamenhof, iniciatinto de Esperanto, kiam li limigis la gramatikon de la internacia lingvo al dek ses simplaj reguloj kaj evitis tiajn komplikaĵojn.

En mondfama marborda urbo du viroj promenas senpacience antaŭ hospitalo.

Unua viro: "Imagu sinjoro... ĝuste nun, dum nia somerumado venas la bebo."

Dua viro: "Tio estas nenio, mia sinjoro... Ni ĝuste nun pasigas nian mielan monaton!"

DANKON al Harri Laine

Nia laboranta redaktoro devis retiriĝi el la aktiva redaktado al aliaj aktivecoj. Onidire lin atendas la "sangimposto", tiun lastemenciitan vorton niaj karaj legantoj ja plej volonte deĉifru laŭ nia propra ruĝa svinglibreto. Espereble la armeo tamen ne suĉu lian tutan sangon, ĉar liaj akraj pensoj ankaŭ estonte spicu nian landfaman esperanto-gezeton. Nia redaktoro tre lerte prizorgis kaj enpaĝigis la gazeton, sekve ĝi havigis al si multajn novajn abonantojn kaj vekis multe da atento ĉie.

La redakcio

ATENTU PRI ŜANĜOJ!

Pro tio ke nia redaktoro Harri Laine forlasis la redaktoran laboron okazis kelkaj ŝanĝoj. Antaŭ ĉio notu, ke de nun ĉio koncernanta la gazeton — kunlaboraĵoj, anoncoj, rezenzotaj libroj, interŝanĝotaj gazetoj same kiel abonpagoj estas adresotaj al

FONDUMO ESPERANTO

Esperantotie 4, IIRISLAHTI (Finnlando)

La poŝta ĝirokonto restas la sama: n-ro 6915. Ĉiu abonpago same enlanda kiel eksterlanda estas prefere pagenda al la konto (eksterlandanoj donu post la numero noton: Finnlando), sed nur abonpagoj kaj eventualaj anoncpagoj. (Por librokomerco valoras alia numero: 6564).

Kiel konstantaj kunlaborantoj en la redaktado funkcios nun samideanoj R.J.Milton, Jussi Jäntti kaj Jorma Ahomäki, sed de ĉiuj legantoj ni kun plezuro akceptas kontribuaĵojn. Do, ek al laboro, niaj legantoj!

La ĉefredaktoro

KONGRESA SAKETO

Por reklami la kongreson moderne ni pretigis utilan saketon kun du-kolora insigno de la kongreso.

Jam ĝi iĝis vera sukceso en Turku, eĉ ne-esperantistoj mendis tiajn. Atendeble la saketo enkondukos novan modon por vojaĝantoj.

Prezo: nur 15:— + 2:— por sendkostoj.

Harri Melasniemi, Mikonkatu 4 C 67, TURKU.

Ĝirokonto 48-1381.

HEROLDO DE ESPERANTO

Aspekto de taga gazeto

Aperas en Nederlando 18-foje dum la jaro

Abonprezo en Finnlando:

Abono "1 por 1" = 18 mk

Abono "2 por 11" = 36 mk

.....
"2 por 11" = Dua ekzemplero iras al orient-europa lando kaj estas tie legata de dek personoj

Poŝta ĝirokonto en Finnlando:

"Heroldo de Esperanto" — n-o 39.786

.....
Nuntempe nomo "Heroldo de Esperanto"
anstataŭ nomo "Tietti"

Pagado je du aŭ kvar partoj:

Ebla ĉe ĉiuj abonoj

Rekomendata ĉe abonoj "2 por 11"

Plilongigo de la pagotempo:

Sur bazo de poŝtkarta promeso

.....
Ĝis tago mem elektita, plej laste

1.10. venontjara

Prezo de anonceto:

25 vortoj = 5 mk

Duobla pago = trifoja apero

Adreso de la peranto:

Hemmo TIETTI, pastro

LETKU

Adreso: Esperanta Finnlando, IIRISLAHTI. Aperas 9-foje jare. Abonprezoj: enlanda 5 mk, eksterlanda 6 mk (15 rpk); abonu prefere per la poŝta ĝirokonto 6915. Anoncprezoj: tuta paĝo 100 mk, duona 50 mk, kvarona 25 mk; pli malgrandaj unukolonaj 0,35 mk/mm. — Eldonas Fondumo Esperanto.

Redaktoroj: Jussi Jäntti, Jorma Ahomäki, R. J. Milton. Ĉies kontribuaĵoj estas bonvenaj.

